


# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ  
Jaro 45-a BRAZILO, APRILO-MAJO-JUNIO 2021 N-ro 182

“Amu vian Dion per via tuta koro  
kaj per via tuta animo kaj per via tuta  
menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”  
Jesuo (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte  
rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”  
Kardec. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.  
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante  
unu la alian, la popoloj faros en konsento  
unu grandan rondon familian.”  
Zamenhof. *La Espero*.



## Dum . . .

**P**ENU AGI POR LA BONO, dum vi disponas tempon. Estas danĝere havi la kapon ĉiam plenaj de revoj, sed la manoj senokupaj. Ekbruligu vian lampon, dum estas hele ĉirkaŭ viaj paŝoj. Neniu vojiranto evitos la surprizojn de la nokto.

Helpu vian proksimulon, dum estas al vi eble. Venos momento, kiam vi devos akcepti lian helpon.

Uzu vian fizikan korpon por ricevi la benojn de la Plej Alta Vivo, dum ĝiaj organoj harmonie funkcias. Vazo enhavinta malvulgarajn esencojn, eĉ forlasite, ankoraŭ elspiras parfumon.

Raportu saĝe la lecionojn, kiujn vi ricevas en la lernejo de la vivo, dum vi disponas la karnan libron de ekzamenoj. Lerni estas beno, kaj miloj da fratoj ne malproksime de vi, atendas stipendion por la enkarna lernejo.

Realigu viajn kontojn kun la najbaro, dum la horo estas favora. Morgaŭ ĉiuj bildoj povos aperi transformitaj.

Neniu devas esti profeto pri la morto nek imiti noktuon malbonaŭguran. Sed dum vi havas okazon kolekti al vi superajn rimedojn por la spirita vivo, pligrandigu viajn proprajn meritojn kaj akiru trezorojn de la animo, konvinkite, ke via transiro en alispecan ekzistadon estas neevitebla.



Libro: *Kristana Agendo* (FEB)  
Spirito: Andreo Ludoviko  
Mediumo: Francisco Cândido Xavier



*Amikoj de Lorenz*

## Enivaldo Alves Silva

ENIVALDO ALVES SILVA, civila inĝeniero, fervora spiritisto kaj esperantisto, naskiĝis la 12an de junio 1948 en Olhos D'água do Casado, Alagoas. Li diplomiĝis pri inĝenierarto ĉe Federacia Universitato de Alagoas kaj esperantistiĝis en 1972.

Li estis prezidanto de Brazilja Esperanto-Asocio kaj ĝenerala direktoro de Bona Espero dum longa tempo. Li estis kasisto de Brazilia Radioamatora Esperanta Klubo, fondita okaze de la IV Kongreso de Brazilia Konsilantaro de Esperanto, en Recife, Pernambuco (1983). Enivaldo estis ankaŭ unua sekretario de BEL de 1989 ĝis 1992 kaj de 2001 ĝis 2004. Li partoprenis la Organizan Komitaton de la 66a Universala Kongreso de Esperanto kiel vicprezidanto (Brasília, 1981).

Enivaldo redaktis la bultenon "Ligilo", eldonitan de BEL. Li estas membro de Internacia Ligo de Esperantistaj Radioamatoroj (ILERA), kies bultenon li redaktis plurfoje.

Li prelegas en spiritismaj kaj esperantaj eventoj, kaj jam partoprenis plurajn brazilajn kaj universalajn kongresojn de Esperanto.

Li estas fakdelegito de UEA pri inĝenierarto, spiritismo kaj radioamatorismo.

Kunlaboris: Eurípedes Barbosa

## Astralaj Karceroj

Nekono de spiritaj bon' kaj vero  
Al homoj kaŭzas staton de sufero  
Ne sole dum la vivo sur la tero,  
Sed ankaŭ ĉi en la astrala sfero.

L' animo fermas mem sin en karcero,  
De l' memo konstruita per fiero,  
Malamo, egoismo, malsincero,  
La ŝtofoj ĉi pli firmaj ol la fero.

Fiero estas karcerist' kruela,  
Malam' – spirita nokto tre malhela,  
Kaj egoismo – firmament' senstela,

L' animo restas sia en karcero  
Ĝis kiam amo, humilec', tolero  
Al ĝi malfermas pordojn de l' libero.

Spirito: João da Cruz e Souza

Mediumo: F. V. Lorenz

*Reformador* (FEB), okt. 1950, p. 227

Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto



## LORENZ

### "KOMUNIKOJ"

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 45-a • n-ro 182 | Aprilo-Majo-Junio 2021

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj  
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

### KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Adreso: Rua Aníbal Bruno, 18 - Santa Cruz  
23520-210 - Rio de Janeiro-RJ - Brasil (Brazilo)  
Tel. +55-21-98427-8080

Retpago: <http://editorialorenz.blogspot.com.br>

Retadreso: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)

Fejsbuko: Editora Lorenz



Kompostita de Rogério Mota



Zamenhof

## Kuriozaĵoj el la Leteroj de Zamenhof

Al Majnov, 7. (19) IX. 1989

Estimata amiko!

MI SENDIS AL VI HODIAŬ la 16 vortaretojn, kiujn vi petis kaj ankaŭ aparte mi resendis al vi la manuskripton de la "Renaskita Manfred" – Mi nun jam pli nenion povas eldoni ĉar mi restis tute sen mono. Sed se la manuskripto estus post la unua peto oficiale subskribita de la aŭtoro, tiam mi farus ĉion kion mi povas por ricevi ian monon kaj presi la verkon, ĉar por nia afero estas grava ne la verko mem, sed la oficiala aprobo de la Gr. Princo. Sed nun, kiam la aŭtoro jam unu fojon rifuzis sian subskribon, ni ne devas lin peti ankoraŭ unu fojon, ĉar la ripetita petado povus lin kolerigi kontraŭ ni. Tial mi petas vin tute forlasi la aferon kun la Gr. Princo. En ĉia okazo mi jam la verkon eldoni ne povas.

La sveda vortaro jam longe estas preta, sed mi ĝis nun ankoraŭ ne havis la permeson por ĝin elasi en la mondon; nun la permeso venis.

P.S. La 1-a kajero de la "Kolekto" povos eliri ne pli frue ol en la mezo de oktobro.

(Fonto: *Iom Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof*. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989.)

### **KUNLABORU !**

Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

### **COLABORE !**

Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Spiritismo em todo o mundo!

## Biblioteko Károly Somogyi

URBA KAJ DEPARTEMENTA Biblioteko Károly Somogyi en Centra kaj Orienta Eŭropo en Hungario situas en urbo Szeged. Szeged troviĝas en departemento Csongrád-Csanád, kies sidejo de departemento estas la urbo Szeged.

La biblioteko funkcias en sia nuna konstruaĵo en la kvartalo de Szeged-katedralo ekde 1984.

La Somogyi-Biblioteko estas la unua el la plej signifaj Esperantaj kolektoj en la lando. Ĝi estis oficiale malfermita la 23-an de julio en la jaro 1961 kiel Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj biblioteko. Hodiaŭ ĝi konsistas el ĉirkaŭ 3.300 libroj kaj ĉirkaŭ 250 specoj de ĵurnaloj. En la kolektaĵo oni trovas ankaŭ partiturojn, heredaĵojn, malgrandajn presaĵojn kaj manuskriptajn verkojn. La dokumentoj uzeblas loke. Post antaŭa sinanonco, la esperanta kolekto videblas. La Somogyi-Biblioteko lanĉis serion de filmetoj titolitaj "Esperantaj Momentfotaj", en kiuj ni memorigas interesajn momentojn de la historio de internacia Esperanto laŭ la dokumentoj de nia biblioteko. <https://www.youtube.com/>

En la kompletigitaj partoj ni memorigas ekzemple la Hungaran Kulturajn Tagojn kaj la Tagojn de Hungara Poezio.

Ni laboras pri la daŭrigo de la serio, kies enhavo baldaŭ disponeblas en la retejo de nia biblioteko: <http://virtualis.sk-szeged.hu/esperanto/>.




S-ino Beatrix Miskolczi Manĝarior bibliotekistino

Retadreso: [manqarious.beatrix@sk-szeged.hu](mailto:manqarious.beatrix@sk-szeged.hu)







Prof. Marco Lucchesi, prezidanto de ABL

## "Zamenhof, kiu estis okulisto, donis al ni novajn lensojn por vidi la mondon."

LA 21-AN DE MAJO, okaze de la Internacia Tago por Kultura Diverseco, deklarita de Unuiĝintaj Nacioj (UN), la malfermo de la Ŝtata Renkontiĝo de Esperanto de Rio-de-Ĵanejro estis farita de la Prezidanto de Brazila Beletristika Akademio (ABL), prof. Marco Lucchesi. Tiu renkontiĝo okazis rete per la platformo Zoom.

La evento estis ja historia, ĉar unuafoje en la historio de esperanto movado de Brazilo la prezidanto de ABL publike parolis en Esperanto kaj tre favore al la lingvo.

Dum la parolado, esperantistoj faris demandojn al prof. Marco Lucchesi al kiuj li respondis tre afable kaj ĝoje. Ĉiuj partoprenantoj sentis sin en vera rondo familia. Lucchesi atentigis pri la gravega situacio de subpremo kontraŭ la indiĝenaj lingvoj en Brazilo, reliefigante la neceson lukti flanke de indiĝenoj kontraŭ tiu situacio. Li same komentis pri la defioj de la tradukoj, kiujn alfrontas la esperantistoj kaj tradukistoj ĝenerale.

Lucchesi estas verkisto, poeto kaj tradukisto kaj konas pli ol 20 lingvojn, inter ili Esperanton, kiun li lernis dum adolesko (kun 14 jaroj). ABL oficiale

represas la portugalan lingvon en Brazilo. Tio estas tre grava institucio, ĉar la portugala lingvo hodiaŭ estas la 6-a plej parolata lingvo en la mondo. La publika agnosko de Lucchesi estas tre grava oficiala rekono por la prestiĝo de Esperanto kaj ĝi certe malfermos multajn pordojn rilate al progreso de la movado en Brazilo.

Lucchesi estas tre konata pro sia laboro en defendo de homaj rajtoj, ĉefe pere de konstantaj vizitoj al brazilaj prizonoj, kie li provas enmeti la universon de literaturo en la maljustajn kaj malfacilajn mediojn en kiuj vivas enprizonigitoj en Brazilo. En 2019, okaze de la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, deklarita de UN, Lucchesi ricevis en la sidejo de ABL, parolante indiĝenan lingvon de Brazilo (gvarania), reprezentantojn de gvarania popolo, kiuj loĝas en la ŝtato Rio-de-Ĵanejro. Estis la unua fojo, kiam tio okazis rilate al indiĝena lingvo de Brazilo, kio tre emociigis ĉiujn ĉeestantojn.

Prof. Marco Lucchesi estas sendube klera humanisto, vera esperantisto kaj homarano. Koran dankon, amiko!

Álvaro Motta

### Gazeto de BAES!

Kun granda ĝojo, Eldonejo Lorenz sciigas ke BAES - Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj, fondita en 2008, eldonis, la unua de majo, sian unuan gazeton. Gratulon al ĉiuj!

ELŜUTU ĜIAN E-VERSION SENPAGE!



[baes.org.br/bonvenon](http://baes.org.br/bonvenon)

### JAM ESTAS TEMPO!

Karaj belegantoj!

Se vi ankoraŭ ne aniĝis al nia Asocio, estas tempo por tion fari. Aliĝante al ĝi vi rajtas ricevi, en la komforto de via hejmo, 2 librojn el nia katalogo, portugale aŭ esperante, **ALMANAKON LORENZ** kaj la bultenon **Komunikoj** (versioj PDF-a aŭ papera). Krome, vi rajtas akiri aliajn librojn el nia katalogo kun rabato de 30%. Skribu al ni kaj petu vian aliĝilon: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)



Célvio Freitas Martins

## Kiun Vakcini La Unua?

POST LONGA BATALADO kaj multege da anksio, finfine oni sukcesis eltrovi vakcinojn kontraŭ la terura kronviruso.

La unua problemo kiu estiĝas estas: kiun vakcini la unua?

Oni pridiskutas: ĉu la maljunulojn, ĉu la sanprofesiuojn, ĉu la bebojn, ĉu la gravedulinojn, ĉu la policistojn, ĉu la politikistojn, ĉu la riĉulojn, ĉu la infanojn, ĉu la instruistojn, ĉu la stratloĝantojn kaj almozulojn?

Tiu pridiskutado estas perfekte normala, ĉar, evidente, ne ĉiuj povas esti vakcinitaj samtempe...

La grandega plejmulto ŝajnas perdita en tiu tempesto, kaj prenas kiel kompason la timegon de la morto. Ilia vivprogramo estas eviti la morton, sed... ĝis kiam? La morto estas la nura certeco de la vivo. Ĉu oni ne devus filozofie pluesplori tiun temon? Kaj samtempe analizi la celojn de la vivo? Ĉu via vivo havas alian celon krom manĝi kaj distriĝi? Kion diri pri la moralaj valoroj kaj pri la ebleco de vivo trans la tombo?

Ili eĉ neniel pensas helpi siajn proksimulojn, ili volas helpi nur siajn familianojn kaj amikojn, sed proksimuloj estas ĉiuj homoj senescepte, en ĉiaj partoj de la mondo kaj el ĉiaj sociaj klasoj... Ni ĉiuj estas fratoj, volonte aŭ ne. Ni ĉiuj devas helpi

unu la alian, pro la bono de ĉiuj. Tiel determinas la naturo kaj esenco de la vivo mem. Religiuloj aŭ ne, ateistoj aŭ ne, krimuloj aŭ bonfarantoj, riĉuloj aŭ almozuloj, ni ĉiuj estas fratoj. Nepras, ke la homoj kaptu kaj encerbigu ĉi tiun mesaĝon de la pandemio. Oni helpu unu la alian senescepte kaj sendiskriminacie!

Dankemo neniom tuŝas la koron de la plejmulto. Se vi ricevas vakcinojn, danku la sciencistojn, kiuj eltrovis ĝin post tiom da lacegigaj laboroj dum sinsekvaj jaroj da scienca esplorado. Neniu dankas al la tombistoj, eĉ ne mencias ties ekziston!

Oni devus vakcini la unua, miaopinie, la sciencistojn eltrovintajn la vakcinojn. Poste, la tombistojn, ĉar ni bezonas iliajn higienajn servojn, temas pri publika sano kaj danko al tiuj kiuj plej multe laboras lastatempe... Ke ili kaj iliaj familianoj kaj amatoj havu sanon kaj medicinan protekton. Trie, oni vakcinu la profesiuojn kiuj injektas en nin la vakcinojn.

Oni almenaŭ memoru, ke tiuj Sciencistoj ekzistas, kaj ke Tombistoj ankaŭ ekzistas!

Oni estu dankaj al tiuj kiuj helpas nin!



## Toleremon



Uzu la mezuron de tolero rilate al via proksimulo, sammaniere kiel vi ŝatus, ke iuj agu kun vi en simila kondiĉo. Neniu ekzistas sur la Tero, hodiaŭ, kiu marŝas sen eraroj, sen timo, sen turmentoj, kiuj kaŭzas afliktoj, malgraŭ tio, ke li deziras trafi; kaj produktante suferojn, malgraŭ tio ke li klopodas pacigi, bezonante komprenemon, same kiel efikon, toleremon.

Do, semu toleron hodiaŭ, por ke vi rikoltu ĝin morgaŭ.

Libro: Vivo Feliĉa | Spirito: Joanna de Āngelis | Mediumo: Divaldo Pereira Franco



Aymoré Vaz Pinto

## Pripensante Doloron

DOLORO ESTAS POR NI de granda utileco. Ĝi estas la plej forta krio por avizi ke io ne bone funkcias en nia organaro. La silentaj malsanoj kiuj, ne doloras, estas pli danĝeraj, ĉar ili permesas la kreskon de la malsano antaŭe al niaj konvenaj disponoj.

Laŭ anatomiaj studoj, ĉiuj kvadrataj milimetroj da haŭto havas dek mil liberajn nervajn finaĵojn por konduki la dolorajn stimulojn. Pro tio la pinĉado estas tro dolora.

Famaj doloroj: kora infarkto, rena kalkuluso kaj akuŝo. Laŭ kelkaj homoj la akuŝa doloro estis justa dia puno.

Nur poste, en la oka akuŝo de la reĝino Viktoria en Aprilo 1853, ŝi akuŝis sub la uzo de kloroformo. La reĝino estis konscia kaj sentis nenium doloron. Ek de tiam la virinoj kalkuladis kun la beno de la analgezio en la daŭro de la akuŝo.

Estas ankaŭ la amika doloro: la tumora fortranĉo, en kiu oni suferas doloron por liberigi sin de la malsano. Oni refortigas sin post la kirurgio, same kiel la vegetalo kiu suferas la tondon por kreski pli,flori pli kaj pli produkti.

La doloro impulsigas ankaŭ la sciencan progreson. Se ne estus la doloro la traserĉistoj ne malkovrus la anestezan efikon de la nitroza acido, de la etero, de la kloroformo, de la kokaino, de la ciklopropano, de la halotano, inter aliaj.

Ni ne devas fini niajn konsiderojn pri doloro sen mencii la psikologian doloron. Por tiu la anesteziiloj ne funkcias. Estas la doloro de la saŭdado aŭ tiu devenata de senprudentaĵoj kiu naskigas ĵaluzoj, malamoj originantaj amarajn statojn. Ĉi tie la psikologio, la religio kaj la amikoj estas de granda helpo.

## Laŭ la antikva ĉina proverbo:

donacante libron, oni donacas animon. Ĉiu libro enhavas unikajn ideojn, vortojn, frazojn ... kiuj kapablas transformi pensmanieron de leganto, riĉigi lian sperton kaj eble influu lian vivon.

Ricevante librojn de Asocio Lorenz, mi plurfoje ricevadis "novajn animojn", kiuj inspiradis min, vekis mian intereson pri universalaj kulturaj valoroj. Mi eĉ povus diri, ke la libroj multe influis mian spiritan maturigon, kio permesis ai mi dividi la trovitajn en ili trezorojn kun geamikoj, gelernantoj kaj legantoj de "Almanako Lorenz".

Estis, estas kaj espereble estas por mi honoro kunlaboradi en la nabra verko de la Asocio. Okaze de la Jubileo, mi esprimas mian dankon pro ĉio kaj deziras al ĝia estraro kaj membroj, fruktodonan kontakton kun libroj - ĉu kiel eldonantoj, ĉu kiel legantoj, ĉar mi estas certa, ke iel ajn funkcios la mirinda, unika intersango de animoj danke al la eldona kaj populariga agado inspirita de la nobla spirito Francisco Valdomiro Lorenz.



Przemysław Grzybowski - Pollando

## KARAJ EKSTERBRAZILAJ GELEGANTOJ DE KOMUNIKOJ EN LA TUTA MONDO!

Se vi volos ricevi niajn librojn kaj la jarlibron, Almanako Lorenz, tutesenpage, perlapdf-aaŭpaperaversioj, senduainimesagonkun via kompleta nomo kaj postadreso Kun granda ĝojo ni ilin sendas al vi: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)

## INTERŜANĜI LIBROJN ANKAŭ ESTAS TREEGE BONVENA!

Vi, kiu ŝatas legi, koni aliajn kulturojn, filozofiojn ... jen grava oportuno: Eldonejo Lorenz ne nur sendas, senpage, viajn librojn al niaj eksterlandaj samideanoj, sed ankaŭ akceptas librojn el aliaj kulturoj, filozofioj ktp. Estas granda plezuro ricevi verkojn el diversaj landoj!






## Omaĝo de Eldonejo Lorenz al Vlastimil Novobilský



LASTIMIL NOVOBILSKÝ, ĉeĥa samideano, emerita universitata profesoro, aŭtoro de pluraj verkoj en Esperanto kaj en la ĉeĥa lingvo; inkluzive de la bela verko pri la patrono de nia Eldonejo, Francisco Valdomiro Lorenz, elkarniĝis la 11-an de februaro 2021 kun la aĝo de 86 jaroj. Vladimir estis ano de pluraj esperantistaj organizaĵoj kiel la Scienca Akademio de San Marino kaj Universala Esperanto Asocio. Li estis unu el la fondintoj de la Universitato Jana Evangelisty Purkyně, en Ústí, kaj poste fariĝis ties Rektoro. Aliajn detalojn pri nia samideano vi trovos en Vikipedio: <https://mallonge.net/a6>



ĜIS BALDAŬ, KARA FRATO VLASTIMIL!

## LA FLUGILA ĈARO DE LA SUNO

EN LA FLUGILA ĈARO de la matenuĝo la ora aŭreolo de la Reĝo-Astro trakuras sian eternan vojon el lumo kaj brilego.

La malhela kaj humida tenebro de l' anguletoj timeme forfuĝas ĉe la alproksimiĝo de la senmakula lumaĵo.

Inter la homoj trakuras mallumo, cele al iliaj rigardoj, penante alproksimiĝi al la profundo de iliaj ĉirkaŭokulaj blurandoj.

Malleviĝante sur la kapojn, brumaj nuboj malgajigas la vizaĝon, malevigante la palperojn, malgajigante la lipojn, faliĝante la larmojn.

Tiel same, kiel la lumo forigas la ombron, ĝi eliminis la mallumon for de la anguloj. Ni estigu la lumon en niaj okuloj, tra la densaj ondoj de niaj ĉagrenoj, tra niaj malsanetoj kaj afliktoj.

Karaj gefratoj, la lumo, kiu apartenas sole nur al la Kreinto, rebrilas tra la senfinaj direktoj kaj estas senfine vasta. Ĝi atingas tute egale ĉiujn homojn, kun la sama intenseco.

Ni ĉiuj estas dronantaj en oceano da Patra amo. Ni ĉiuj estas absorbitaj de la brilega lumo de la Dia amo.

Al ni restas la strebo forpreni la skvamojn el niaj okuloj, miksi la bagatelojn de la humileco kun la salivo de la laboro por forbalai la obstaklojn, kiuj nin blindigas.

La posttagmeza malvarmeto falu kun la roso de la kvieteco, ĝi kovru nian kapon. Forlasante la materian korpon, ni povu ekmiri kun nia spirita, luma, neĝblanka kaj subtila spirita korpo.

Ni povu priskulpti nian ŝtonon kaj elpreni el ĝi nian personan majstroverkon: Nin mem!

Ke la Patro benu la bonajn intencojn, kiujn ni klopodas fari por atingi la feliĉon.

Ho, Patro, superega idealiginto de niaj destinoj, ekmastru niajn piedojn kaj montru al ni la ŝtonojn, kiujn ni devas surpaŝi. Direktu per niaj fingroj la vojon, kiun ni devas laŭiri. Direktu nian bruston al la vera celo.

Dank' al Dio.

Spirito: Antônio Francisco

Mediumo: Manuel Francisco

El la portugala tradukis: Benedicto Silva

Kunlaboris: João Ângelo





Benedicto Silva

## La Geniuloj estas Modestaj

EL ĈIUJ VERKOJ TRADUKITAJ de mi, almenaŭ du estis malfacile kaj penige tradukeblaj pro la poezieco de sia lingvaĵo. Mi parolas pri "Iracema" de José de Alencar kaj "Filigranoj el Lumo" diktita de la Spirito Tagore al la mediumo Divaldo Pereira Franco.

Super ambaŭ mi devis ŝvite penadi por traduki subtilajn pensojn de la aŭtoroj, pensojn esprimitajn per rafinita, malfacila, subtila lingvaĵo.

Kuriozan fakton pri la tradukado de "Filigranoj el Lumo" mi volas rakonti nun:

Post du-tri jaroj da la peniga laboro super la tradukado de tiu libro, kies teksto jam estis preta por presado, mi komencis la tradukadon de la antaŭparolo. Mi reliefigas, ke tiu antaŭparolo, tute kontraŭe al la poezia lingvaĵo de la portugallingva originalo, sin prezentis en tre simpla, vere ĵurnalisma lingvaĵo. Tamen, malgraŭ tiu lingva simpleco, mi ne sukcesis ĝin esperantigi! Mi tradukadis la unuan paragrafon (kun nur ĉ. 5-6 linioj!) kaj mia menso kvazaŭ obstrukciĝis, neniigis... Tio okazis plurfoje. Mi maltrankviliĝis. Kiam mi rakontis tion al mia karmemora edzino, ŝi nur ridis, ne kredante.

Ĉiufoje kiam tio okazis, mi rezignadis daŭrigi la tradukadon de tiu mistera antaŭparolo, metis ĝin en la tirkeston, kaj revenadis al ĝi nur post unu, du, tri tagoj... kaj ĉiam okazis la samo.

Iam, jen oni anoncis, ke Divaldo Pereira Franco vizitos spiritisman societeton en São José do Rio Preto! Tio ja okazis. Ĉe mia renkontiĝo kun la eminenta spiritisma oratoro, post la saluta brakumo, li demandis min:

— Benedicto, kiel iras nia libro?

— Divaldo, ĝi jam estas tute tradukita kaj reviziita. Baldaŭ FEB ĝin presos kaj lanĉos! Tamen, tio ankoraŭ ne okazis ĉar mi ne sukcesas traduki la antaŭparolon, malgraŭ tio, ke ĝi estas verkita en tre simpla, ĵurnalisma lingvaĵo.

Divaldo ne hezitis, kaj tuj diris al mi:

— Benedicto, ne traduku la antaŭparolon... Tagore ne volas, ĉar per tiu antaŭparolo oni laŭdas lin kiel eminentan poeton kaj pensulon. Tial Tagore simple blokadis vian menson ĉe la tradukado...

Kaj efektive post kelkaj semajnoj FEB lanĉis mian tradukon, sen la antaŭparolo...

## KONSTRUANTE KATEDRALOJN EN LA ANTROPOCENO

Kiel la filozofio pri reenkarnejo povas helpi en la formado de la bona pragepatro

Prelegontoj:



ÁLVARO MOTTA



AFFONSO SOARES



ALLAN ARGOLO

Eldonejo Lorenz ĉeestos la Virtualan Kongreson de UEA, kiu okazos de la 17-a ĝis la 24-a de Julio.

Por ĝin spekti, aliĝu per [vk.esperanto.net](http://vk.esperanto.net)



2<sup>a</sup> VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO  
17-24 de JULIO 2021

"Paco kaj konfido: universalsaj valoroj"



LORENZ

## NI REKOMENDAS

### EKKONU LA PROGRAMON:

## "MIA AMIKO"

Tiu programo ne estas simpla metodo por instruado de Esperanto. Ĝia ĉefa propono estas, krom instrui la lingvon, ankaŭ fari esperantistojn, kiuj povos fariĝi instruistoj kaj volontuloj por nia movado.



Pli da informoj:  
[esperanto.brazilo.org/programa-mia-amiko](http://esperanto.brazilo.org/programa-mia-amiko)

SEN PAGA KURSO